

**BAPTO DE LA SINJORO – 10-an de januaro 2016 - Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

***KIAM JESUO ESTIS BAPTITA DUM LI PREĜADIS, LA ĈIELO MALFERMIĜIS***

**El la evangelio laŭ Luko 3, 15-16.21-22**

**En tiu tempo la popolo streĉe atendis, kaj ĉiuj demandis en sia koro pri Johano: „Ĉu estas li la Mesio?” Sed Johano diris al ĉiuj: „Mi vin baptas per akvo; sed venas Tiu, Kiu estas pli potenca ol mi. La rimenojn de Liaj ŝuoj Mi ne estas inda malligi. Li baptos vin per la Sankta Spirito kaj fajro.”**

**Dume la tuta popolo estis baptata, kaj Jesuo ankaŭ estis baptita;, kaj dum Li preĝis, la ĉielo malfermiĝis. kaj La Sankta Spirito malsupreniris sur Lin en korpa aspekto kiel kolombo; kaj venis voĉo el la ĉielo: „Vi estas mia Filo, la amata; en Vi Mi havas plezuron.”**

Antaŭe en la dezerto Johano Baptisto anoncis bapton kiel signon de konvertiĝo, nome de vivoŝanĝo, por la pardono de la pekoj. La respondo estis neatendita: la tuta popolo alkuras al li. La popolo komprenis, ke la pardono de la pekoj ne povas okazi en la templo per ago liturgia, per oferado al la Sinjoro, sed per vivoŝanĝo.

Sed, se la popolo kredis al Johano Baptisto kaj kuris al li, la religiaj instancoj, la ĉefoj, ne, ili ĉiam rifuzis ĉiajn ŝanĝojn.

Ni legu atente la evangelion de ĉi tiu dimanĉo, la trian ĉapitron de Luko, ekde versiklo 15,“la popolo streĉe atendis, kaj ĉiuj demandis en sia koro pri Johano: „Ĉu estas li la Mesio?”

La popolo kredas, ke tiu profeto en la dezerto estas ĝuste la atendata liberigonto de Izraelo. Sed Johano respondas tuj, ke ne estas li. "Johano diris al ĉiuj: „Mi vin baptas per akvo“, nome mi trempas vin en likvaĵon ne apartenantan al la homo, signo de vivoŝanĝo, por la pardono de la pekoj; "sed venas Iu, Kiu estas pli potenca ol mi", kaj Luko uzas vorton kompreneblan nur se oni konas unu aspekton de la tiama kulturo "Mi eĉ ne estas inda malligi la rimenojn de Liaj ŝuoj ". Kion intencas diri Johano Baptisto per tiu frazo? Por la tiutempa geedza stato validis leĝo, nomata "de bofrateco". En kio ĝi konsistis? Kiam ino sen idoj vidviĝis, estis devo de la bofrato ŝin gravedigi, kaj la naskoto ricevos la nomon de la mortinta edzo, kies nomo tiel pluvis.

Se la bofrato ne volis obei tiun leĝon, probable pro intereso, ĉar vidvino sen idoj estus devinta reiri al sia origina familio, la viro, kiu heredis tiun rajton post li, plenumis la riton de "senŝuigo": li deprenis la sandalojn de la bofrato, kraĉis sur ilin kaj ilin tenis por si. Tio estis simbola gesto, signifanta "via rajto gravedigi tiun vidvinon ekde nun estas rajto mia". Tiu rito estas citita en la Malnova Testamento (Rut 4,7).

Jen do la signifo de la frazo de Johano Baptisto: "*Mi eĉ ne estas inda malligi la rimenojn de Liaj ŝuoj*" signifas: *ne mi rajtas gravedigi ĉi tiun vidvinon* (la vidvino estis la Izraela popolo), sed "*Tiu, Kiu estas pli potenca ol mi*", ĉar "*Li baptos vin per la Sankta Spirito*"... Mi vin trempis en akvon, simbolon de vivoŝanĝo, sed Li en la dian vivon mem "*...kaj fajron*"

La postaj du versikloj ne estas en la hodiaŭa liturgio: ili rakontas la enkarcerigon de Johano Baptisto. Tiu estas la reago de la povo kontraŭ la konverto. La potenculoj neniam akceptas ŝanĝojn. Sed tio estas la stulteco de la povo. Kiam la potenculoj volas silentigi unu voĉon, tuj eksonas alia, pli laŭta.

Ni rekomencu la legadon de versiklo 21: "*Dume la tuta popolo estis baptata*"...do la popolo komprenis, ke la pardono ne estas en la templo kaj en la oferdono, sed en la dezerto kaj la trempiĝo.

Kaj nun aperas Jesuo, kiu mem sin baptigas. Kial baptiĝas Jesuo? Por la popolo la bapto estis simbolo de morto: morto de la peka paseo por komenco de vivo nova. Ankaŭ por Jesuo ĝi signas morton, ne de peka paseo de Li ne spertita, sed de morto akceptota en la estonteco. En ĉi tiu evangelio Jesuo diros, ke por Li estos bapto, kaj ke li vivos en angoro ĝis tiu momento.

Do li aludas al sia morto. Por Jesuo, sin baptigi signifas: pro mia fideleco al la amo al Dio mi akceptos persekuton kaj morton. *"...dum Li preĝis, la ĉielo malfermiĝis.* Kion reprezentas tiu malfermiĝo? Tio estas la daŭra kaj definitiva komuniko inter la homo kaj Dio. La ĉielo simbolas la diecon.

Kiam homo, kiu fidele proklamas la amon de Dio, jen tiu komuniko inter Dio kaj homo neniam ĉesas. Tio okazas ĉe Jesuo.

*"...kaj la Sankta Spirito malsupreniris sur Lin..."* , la difina artikolo montras tutecon. La Spirito estas la forto, la energio de la Dia amo malleviĝanta ĝis Jesuo. Kial Luko diras *"...en korpa aspekto"*? Por diri reale, tutece *"...kiel kolombo"*. La kolombo memorigas plurajn aferojn. Unu estas la spirito de Dio ŝvebanta super la akvoj ĉe la komenco de la kreado (Gen 1,1): la rabenoj interpretis tion donante al la Spirito la aspekton de kolombo, kaj tio povas signifi, ke en Jesuo estas nova kreado. Alia bildo estas la kolombo eliranta de la arkeo de Noa post la diluvo (Gen 8, 12), aludanta al la pardono.

Jesuo estas la pardono de Dio. Ekzistas juda proverbo pri "amo de kolombo al sia nesto". La kolombo amas neston sian: novan ĝi ne akceptas. Do Jesuo estas la nesto de la Spirito, kie manifestiĝas la pleno de la Dia amo.

*"...kaj venis voĉo el la ĉielo: "do de Dio"... Vi estas mia Filo, la amata",* do la heredanto: *"...en Vi Mi havas plezuron.* "Do Dio konfirmas ke en Jesuo estas lia realo, kaj la popolo tion akceptu.